

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO




62a jaro n° 2
majo - junio - julio 1970

Sonorilo

TRIMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO
Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken Tel. (03)276643

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
Dro Kempeneers Paul Sielens Henri

ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

VICPREZIDANTO
Roose Fernand

ĜENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTO Balleux René, Oude Donkiaan 83 Deurne

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
F-ino Orsolini A.
rue P. Pastur 6, Charleroi P.K. 2016 40

intelsat

nova

lingvo-imperiisma

ofensivo ?

La 16an de februaro komenciĝis en Vaŝingtono la konferenco de Intelsat, la mondorganizajo por telekomunikoj per satelitoj. La demando kio rezultos de tiu konferenco estas kompreneble ege grava. Dum Eŭropo perdis sian tempon kun sterila diskutado, la Sovet-Unio realigis la televido-komunikojn kun la socialistaj landoj per siaj Molniya-sputnikoj kaj Usono konstruis mondampleksan telekomunikon-reton per siaj Intelsat-satelitoj.

En 1964 proksimume 60 landoj de Ameriko, Okcident-Eŭropo, Kanado, Aŭstralio kaj Japanio subskribis akordon pri internacia telekomunikosistemo : Intelsat, administrata per la Usona privata "Communication Satellite Corporation (COMSAT). Evidente tiu akordo povis nur konfirmi la superecon de Usono. Sed, esperante ke ili estos sufiĉe frue kapablaj iom ekvilibrigi la enorman influon de Usono, la Eŭropaj landoj konsentis subskribi la akordon nur kun provizora karaktero kaj validan nur ĝis 1969

La nuna konferenco devus do efektiviĝi definitivan akordon. Kompreneble Usono volos konservi sian dominan pozicion. La aliaj landoj, kontraŭe, esperas malpliigi la superregon de Usono. La evoluantaj landoj, kiuj neniel povas jam realigi proprajn projektojn, kalkulas je Eŭropo por kontraŭbatali la Amerikan monopolon kaj rekonigi sian rajton je kultura sendependeco. Tamen, malgraŭ kelkaj progresoj, la landoj de Eŭropo estas same malfortaj kiel en 1964 kaj estas tre dube ĉu ili povos rompi la monopolon de Usono kiu posedas 53 % de la kapitalo de COMSAT, des pli ke klopodo de la Okcident-Eŭropa Unio, realigi komunan Eŭropan fronton, elrevige fiaskis.

Oni ne povas dubi ke Usono eluzos sian superecon kaj la dividecon de la Eŭropanoj por certigi sian hegemonion ankaŭ sur la kampo de telekomunikoj. Multsignifa tiurilate estas la diskurso kiun S-ro Robert Sarnoff, prezidanto de la R.C.A. Corporation, unu el la pjeĝ grandaj Usonaj entreprenoj por la konstruo de elektronaj aparatoj, faris antaŭ kelkaj tagoj en la Amerika Ĉambro de Komerco en Francio kaj en la Amerika Klubo en Parizo.

Estas vere ke S-ro Sarnoff faris alvokon por internacia kunlaboro sur la kampo de telekomunikoj. Sed la fakto ke li tuj aldonis ke Usono kaj la Sovet-Unio devas komenci ellabori tian projekton, vekas dubon pri la sincereco de tiu alvoko rilate al la aliaj landoj. Oni emas ja kompari ĝin kun la ripetataj amerikaj deklaroj por paco dum tiu lando daŭrigas kruelan militon en Vjetnamio.

S-ro Sarnoff diris ke "estas nur du ebloj : aŭ komuna merkato por telekomunikoj, aŭ vera Babela konfuzo de lingvoj kaj teknikoj". Tio estas tre prava. Sed strange estas ke li ne plu aludis al la lingva konfuzo kiam li aldonis ke "la intereso de la nacioj postulas ke ili atingu interkonsenton pri la frekvencoj, la tarifoj, la ekspluatarajtoj, la batalo kontraŭ la interferoj kaj la libero uzi la servojn de la komuniko-reto.

Ĉu oni devas konkludi el tio ke laŭ S-ro Sarnoff la lingva konfuzo estos solvata per la ekskluziva uzo de la angla lingvo (almenaŭ en la kapitalismaj landoj) ?

Kaj ĉu tio estas ankaŭ la koncepto de Usono ?

Esperu ni ke la Eŭropaj registaroj ne unu fojon pli submetiĝos al la Usona imperiismo kaj ke ili ne foroferos nian kulturan sendependecon kiel ili jam foroferis nian ekonomian kaj politikan sendependecon.

Kaj kion faras la Esperanto-movado ? Ĉu ĝi ne devus almenaŭ rekomendi al Intelsat kaj al la partoprenantaj landoj eviti novan lingvodiskriminacion akceptante Esperanton por la telekomunikoj ?

Hector Boffejon

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875

LA VOJO AL LA VENKO : ROMPI LA BOJKOTON !

Leginte mian artikolon en la julio-aŭgusto-septembra numero de Sonorilo pri la neceso de organizado de Esperanto-aktivistoj, kelkaj samideanoj aprobe skribis al mi.

Kelkaj..... sed tro malmultaj !

Kaj la aliaj ? Ĉu ilin ne interesas la venko de nia afero ?

Karaj geamikoj, vi prave nomas vin esperantistoj. Vi ja lernis Esperanton kaj kelkfoje eĉ uzas ĝin ĉu korespondante kun alilanda esperantisto ĉu parolante en kongreso. Kaj krom tio vi ĉiumonate kunvenas kun kelkaj amikoj por kune trinki glason da biero rigardante filmon aŭ lumbildojn pri iu feria vojaĝo. Kaj plue ?... Vi esperas ! Vi esperas ke iam Esperanto estos oficialigita. Sed ĝuste en tio vi eraras. Ne pro via espero Esperanto estos oficialigata. La venko ne falos en viajn manojn kiel donaco el la ĉielo. Ĝi devas esti konkerata !

Estas jam tempo ke vi konsciu ke nia afero havas ankoraŭ multajn obstinajn malamikojn kies rezisto ne povas esti subtakata.

Multaj lingvoinstruistoj, interpretistoj ktp. kontraŭas Esperanton pro egoismo ĉar ili prave aŭ malprave timas perdi sian vivtenan enspezon. Ni esperantistoj kategorie metu la komunan intereson de la homaro super ilian privatan intereson !

La grandaj potencoj, kiuj pretendas regi la mondon, ne volas la neŭtralan Esperanton kiel mondlingvon, sed volas altrudi sian propran lingvon al la mondo kiel ili faris tra la tuta historio. Ili hipokrite laŭdas nian belan idealon kaj kuraĝigas nin daŭrigi nian agadon por ĝi kaj samtempe ili faras ĉion eblan por malebligi ĝian realiĝon, ĝuste kiel ili daŭre laŭdas kaj predikas pacon, samtempe farante malhomindan kruelan militon.

La potencavidaj politikistoj, krom kelkaj laŭdindaj esceptoj, same hipokrite ludas la saman ludon. Pledante antaŭ ni por Esperanto, ili efektive subtenas la lingvon de la potenco de kiu ili rekte aŭ nerekte atendas politikajn avantaĝojn. Ankaŭ multaj el ili, havinte la okazon bone studi fremdajn lingvojn, timas perdi sian privilegion kaj superecon super la unulingvanoj kies gvidantoj ili pretendas esti.

Estas jam tempo ke vi komprenu por atingi la oficialigon kaj ĝeneralan uzadon de la neŭtrala mondlingvo Esperanto, estas nepre necese aktive kaj venke kontraŭbatali la lingvajn egoismon, hipokritecon kaj imperiismon.

Mi rifuzas kredi ke inter vi ne estus multaj kiuj estas konsciaj pri tio kaj kiuj estas pretaj lukti por ĝi. Al ili mi turnas min kun la alvoko kontaktigi kun mi por kune ekzameni kiel ni povus organizi la batalon por rompi la bojkoton kaj konkeri la venkon de Esperanto.

Hector Boffejon
Zegersdreef 95
2130 Brasschaat

LA NECESO DE PEDAGOGIA REVUO

La edukadscienca scio estas granda. En ĉiuj landoj de la mondo oni esploras kaj provas novajn eblecojn. Sed kiel ajn granda estu ankaŭ la progreso, ie en iu ŝtato au lando, ĝi ne povas esti komplete, ĉar ĝi nur povas esti mozaika.

Kompreneble ekzistas gravaj artikoloj kaj libroj, sed ili estas skribitaj aŭ en la angla, en la germana, en la rusa aŭ en la franca. Sed kie restas la plej gravaj artikolo el la nederlanda, el la hispana, el la portugala, el la itala, el la kroata, ĉeĥa, slovena, rumana, persa, afgana, pola, islanda kaj el la japana aŭ araba lingvoj ? por nomi nur kelkajn.

Jam 1907 diris Zamenhof en sia granda parolado en Guild-Hall de Londono : "La ekzistado de Lingvo Internacia per kiu povus kompreniĝadi inter si la homoj de ĉiuj landoj kaj popoloj, alportus al la homaro grandan utilon."

En nia manoj ni nun havas ĉi tiun mirindan, senkomparan instrumenton. Alligante al nia malnova tradicio, mi alvokas ĉiujn geinstruistojn : **Ni kune eldonu novan pedagogian gazeton** kaj tradicie ni nomigu ĝin

Internacia Pedagogia Revuo

Ĉi sekvu du esencajn celojn :

1) Ĉi prezentu ĉiun gravan aperaĵon sur la pedagogia kampo, kaj tio en la plej vasta senco !

2) Ĉi helpu formi komunan pedagogian mondpercepton !

Por la ekstera formo mi konsideras jenan planon :

- a) Teoriaj bazaj artikoloj el la pedagogia scienco
- b) Fakmetodaj kaj didaktikaj pritraktaĵoj
- c) El la instrupraktiko (raportoj el la klasĉambro)
- ĉ) Informoj el la pedagogia vivo
- d) La opinio (insignoj, sugestoj, rimarkoj, kritikoj)
- e) Anoncoj, reklamoj

Tamen la eldono de nia IPR dependas de du gravaj kondiĉoj :

- 1) de la nombro de la abonantoj (ĝis nun abonis 300).
- 2) de la kunlaborado de ni ĉiuj.

El ekonomia vidpunkto ni bezonos proksimume mil abonantojn, tiam ni povus fari la gazeton por tri ĝis kvar steloj - **po kajero**.

Samsence gravaj estas la kunlaborantoj, kaj mi kuraĝiĝas akcenti, ke ni ĉiuj estu respondecaj pri la prospero de la revuo.

Ke ĝi ne alportu al mi komercan profiton, estu nur flanke rimarkata. Ĉiujn, kiuj ĝis nun mendis la gazeton, mi tutkore dankas.

Mi nun atendas :

- 1) novajn abonantojn,
- 2) artikolojn kaj kontribuojn

al jena adreso :

rektoro Helmut Sonnebend
Im Eckerkampsfeld 11a
3161 Dolbergen Germanujo

La kongreso en Aachen ...

kaj la junulargrupo de Sint-Kruis

Sabato 28.

Ni foriris el Brugge je la dua, tutplenaj de bona kuraĝo. Sed ni forgesis ke ni devus veturi sur la aŭtovojo Brussel-Oostende, la ekzemplo de bona aŭtovojo. Fidel al ĝia nomo, tiu ekzemplo zorgis ke ni nur alvenis al Aachen je la kvara horo en la nokt, post longtempa atendo kaj serĉado.

Dimanĉo 29.

Tiuj, kiuj ne plu dormis, povis sekvi la interesajn debatojn kiuj proponis Esperanton, neŭtralan (kaj internacian ?) lingvon, kiel la "helpilon" por solvi internaciajn problemojn. Vespere, post intemeca vagado en Aachen, oni volis konvinki nin ke Fiat estas la ideala aŭtomobilo : io, kion ni spertis mem per nia aŭtobuso.

La sekvanta esperanto-filmo faris ke kelkaj inter ni ankaŭ ne dormis la sekvantan nokton !

Lundo 30...

...estis la tago por vizitado : inter du mesoj admiri la katedralon, tra malnovaj tempoj vagadi en la muzeo kaj silentiĝi pro la grandeco de la urbdomo.

Posttagmeze, ni spertis ke oni ne estas tre gastama en Germanujo por longharaj knaboj en trinkejoj, ankaŭ ne por junaj knabinoj en dancejo.

Mardo 31.

Restas ankoraŭ vizito al la atomcentro. Ni certe ne forgesos la promeson de la direktoro, ke li farus de la sekvanta propaganda filmo version en Esperanto.

Tiel finis la kongreso, kiu estis tre gaja por ni, sed tre mallongtempa por lerni, kiel ni devas, flue paroli Esperanton.

via kritikokula D. I.

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 19.-26. de julio en La internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis

Ingemannsvej 9

DK-8230 Abyhøj, Danlando

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 18. - 24 de okt. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

Recenzoj

William Auld "La Infana Raso" - poemo en 25 ĉapitroj. Dua eldono de "Stafeto" sub direktado de Prof. Dr. J. Regulo Perez, 1968. La Laguna de Tenerife, sur la Kanariaj Insuloj, 121 paĝoj. Prezo : 1.50 Us. Dol. aŭ egalvaloro. En la serio de la "Belletraj Kajoroj" ; malgranda formato.

Okaze de tiu-ĉi reeldono de la fama poemo de W. Auld, ni republikigas ĉi sekve la recenzon de nia eminenta kunlaborinto D-ro F. Couwenberg, aperinta en "Flandra Esperantisto" de Jan. 1957.

Oni povas riproĉi al la Esperantopoezio, ke ĝi rampas laŭ rutine tradiciaj vojoj, ĉiam kaj por eterne tiklante ĉiutagan emociiĝemon aŭ patose pinĉante la kordojn de sia liro por laŭdegi la mistikajn ecojn de Lingvo kaj Movado. Oni povas riproĉi, ke ĝi mizere lamas, obstine saltetante laŭ antikviĝintaj ritmoj kaj melodioj, — bedaŭri, ke ĝi ne sampaŝas kiel la nacia poezio daŭre penanta por trovi novajn fontojn, neiritajn vojojn. Provon de renovigo prezentas la „Stafeto“ per ĉi tiu sia sepa numero, tiel pluportante la torĉon de la Esperanto-belliteraturo.

La Infana Raso jam ne estas tiel nekonata. Dum la Universala Kongreso en Zagreb, 1953, la juĝa komisiono pri belartaj konkursoj distingis la samtitolan enkondukan „kanton“ per la plej alta premio por la originala poezio. De tiam la poemo konsiderinde ampleksiĝis. En 25 subdividoj (ĉu ni nomu ilin „kantoj“ ?) la aŭtoro disvolvas kelkajn aspektojn el sia pli ĝuste cerba temo : konsideroj pri la homvivo ĝenerale, pri sia propa homvivo speciale.

Kio, laŭ la kompreno de la aŭtoro, estas homo en la evoluiĝo de la surtera vivo ? Sensignifa ĉenereto, apenaŭ perceptebla punkteto, nura okultiko. Miljaroj kaj miljaroj pasis de kiam la vivo ekaperis. Tamen ni ne povas fieri pri progreso de nia civilizo :

„de nia praamebo ĝis vi — sekundpaso ;
apenaŭ vojkomence sin trovas nia raso.“

Povra infana raso, kiun la spertoj ne instruas, — kiu daŭre baraktas en murdaj disputoj, en kruelaj militoj. Tamen ĉiuj homoj estas fratoj : la sama sango pulsadas en niaj vejnoj. „nin ambaŭ kreis iam la sama ingvenotiko.“ Dume la homo maŝine obeas la blindan peladon de siaj prainstinktoj : sinkonservo, sinreprodukto. Blinde li pluiras, forĝas novan ĉeneron en la raso vivo. Tiel plenuminte la celon, li malaperu.

Tamen al la aŭtoro restas brileto de optimismo, li ankoraŭ ne rezignas pri sia fido je pliperfektiĝo de la homa kondiĉo, „se niaj posteuloj nur estos pli sinceraj“ :

„mi kredas pri la bonvolo de l' homaro,
ke iam pasos kruelo kaj amaro, ke iam venos la regno de l' racio ;
sed multaj larmoj necesos antaŭ tio.“

Tamen, ne sen amaro li konsciiĝas ke „nek vi nek mi ĝisvivos la maturiĝon, necesas jarmiliono.“

Dume la sorto senkompatas muelas la homon : „La karuselo de vivo giras freneze : labori por manĝi, kaj por labori manĝi.“

Robote li vivas : „Dum tuta vivo karbon mi ŝovelis ke povu ia granda forn'funkcii, sed kion tiu funkciigo celis ne scias mi, kaj ne deziras scii.“

(Nu, ĉu vi ne aŭdas sordine : „Dekses tunoj...“ ?)

Foje li ribelas kontraŭ la morna grizeco de la ekzistado, plonĝi li volus, kaj tuj, en la ĝuojn de la hodiaŭo, ĉar „pinĉas l' orelon Morto : „Vivu, ĉar venas mi.“

Bela ja estas la vivo, se la homo mem ne ĉiun belon venenus :

„...mondo, kiun la homo detruas,
plago de l' universo tuberkulozo de l' tero“...

Laŭ instinkta kontribuo al la plenumo de la celo, al la vivteno de la raso, neniel satigas la aspiron al feliĉo,

„ĉar nia MI bezonon por pli ol tio sentas :
tedaĵo de l' ekzisto komencas min teruri —

kaj ni alian solvon ne trovas... ol forkuri
en dogmojn, superstiĉojn, kruelon kaj doloron
kaj sklave ni diigas, nu, Kriston aŭ Laboron...“

Ĉu pri religio la homoj sin interturmentas, kvankam pri Dio „nia kompren“ sumiĝas je... nenio : konjektas oni, kaj por sia solvo pretendas pravon de perfekta scio.“

Tamen... „ĉu koncernas la najbaron se kredas mi laŭ propra teoremo ?“

Plej grandan konsolon ĉerpas la poeto el amo : amo al sia panjo kiun la vivo misuzis, amo al sia infano, kaj precipe amo al sia kunulino. Pleje ĝuos la leganto tiun kvinan kanton, lian Altan Kanton. Ĉi ja pleje sonas ĝenerale home. Obsede li amas la karulinon, anime, korpe. Li antaŭscias, ke la publiko ofendiĝos : „Kanto vin oni nomos erotika“. Tamen animo sen korpo estas nenio. Plie, ĉu ni ne adoru diajn farojn ? Nu, „Li kreis uju kaj niajn konturarojn“. Arde kaj plej sincere soras lia kompleta homa sopiro al la ununura elektitino. La kelkloke iom tro kruda envortigo de la korsento tamen — kaj kiel domaĝe — rompas plenan ĝueblecon. Estas ja aferoj kies ĉarmo paliĝas, se tro realisme nomataj. Ankaŭ ĉe nepruduloj.

Ne ĉiam la senco de la poemo estas travidebla. Ĉi male plurloke efikas enigme, svarmigante demandosignojn antaŭ la mirigita leganto. Se ĝi celis fariĝi eksterkutime malfacila verko, fermita al ordinara poeziamanto, ĝi plene sukcesis. Preterme ure sukcesis. Kompreneble, oni ne kriiku la aŭtoron, se li trafos memoron aŭ subkonscion, se li fidiĝe skizas siajn reagojn antaŭ spertoj registrataj dum sia vagado tra la mondo, aŭ se li aludas legajn hazarda falintajn en liajn manojn.

Poeto tutsimple sekvas nekontraŭstareblan impulson al kreado, neglektante la leganton. Lia sendiskuta rajto. Ĉu se pro tio la leganto ne, aŭ nur parte, komuniĝas kun li en la ĝuado de la belo.

Ĉu ni mallaŭdu, ekz., la sesan kanton pro tio, ke ĝi mirige efikas kiel surrealisma pentraĵo de Salvador Dali : kun ĝiaj detaloj frape precizaj kaj majstre finpentritaj, dum la senco de la tutaj nekaptible eskapas ?

Interkrampe : la ilustraĵoj de P. Lavalle, ŝajne neniel rilatantaj al la enhavo de la verko, impresas same avangardaj kaj avantaĝe kongruas kun ĝia spirito.

La celo de la eldonanto estas alia : prezentante la verkon al la publiko, li zorgu ke ĝi estu plejeble ĝuebla. Necesas klarigoj, komentarioj : leganto ja ne estas vivanta enciklopedio.

Ĉar kiu rekonas Grabowski en la kvarlinia biografio de XVI, se ia hazardo ne estus lin gvidinta al la koncerna artikolo de la Enciklopedio de Esperanto ? Kiom estus informitaj pri la unuaj balbutsonoj de la prahomo SALBERJON, ROS, se dank' al simila hazardo ili ne estus trafinitaj la teorion de Marr, trafoliante la „Retoroko-n“ de Lapenna ? Al kiom la nura titolo „Les Sylphides“ sugestus la primuzikan preferon de la poeto se ili ne jam posedas la Chopinan baleton en sia kolekto de gramofondiskoj ? Kiel identigi kun Ĝengis Kan la sovaĝan konkiranton, galopantan tra la stepoj meze de milita tumulto ? Ĉu vere la kondamnitaj bildoj de Lawrence estas tiel konataj, ke la aludo senplie klariĝas ? Kiun admiratan skulptiston trafis samspeca cenzuro ? Kiu estis Falhey, Orsipo, Newell ? Kaj la listo de sfinksajoj ne elĉerpiĝis.

La leganto staras same senhelpa antaŭ netroveblaj vortoj : adolte, elano, saŭdada, betelĝuzo, akvo-sion, fragila, degni, lingamo, bobeli. La poeto pliriĝigu sian lingvon se neceso lin devigas, sed la eldonanto ne lasu en embaraso.

La poemo abunde pruvas, ke la aŭtoro lerte estras la teknikon de la versfarado, kiam li konstruas plurajn kantojn laŭ la tradicia recepto de regula ritmo, apogata de puraj rimoj. La natura malriĉeco de Esperanto je puraj rimoj tie kaj ĉi tie korektiĝas laŭ ekzemplo de la budapesta skolo per parenkrimoj (trombo/trompo, plenumiĝis/sufiĉis, k.t.p., eĉ signoj/stigmoj). Ankaŭ preskaŭrimon ni trovas : tamen/malamon. La VI-a kanto bele ilustras la uzon de la agordo : nigraj/ograj, muron/moron, ostoĵ/bestoĵ ; k.s. Nur la XIX-a apostrofus la finan silabon por formi ascendajn piedojn. Sendube tiu versformo ne ĝuas la favoron de la aŭtoro.

En aliaj kantoj forestas rimoj kaj severa ritmo. La IX-a ekz. sonas kiel prozo. Sed ne estus la tipografia aranĝo, ĝiaj seke informantaj citaĵoj, vere sentus sin fremdule en poemaro. Same por XIII.

La eksperimentado ne ĉesas tie : ellaso de interpunkciaj signoj, apliko de

tipografiaj artifikoj rememorigas pri la tekniko de nia Paul Van Ostajen en la intermilita periodo. Sed la provo almenaŭ havas la meriton montri, ke Esperanto taŭgas por novigajoj tiel bone kiel la naciaj lingvoj.

Vortludojn la aŭtoro ne malestimas, li ne kaŝas tiun ŝaton : „lingvo sen vortludoj mortnaskiĝus”.

Ni ne silente preterpasu la IV-an : satiron pri generaloj, politikistoj kaj pastroj kiuj asertas ke milito necesas, ke nur per malamo ni venkas malamon. En tiu burleskajo la aŭtoro lerte aliformigas la vortojn, tiel sugestante mokajn kromsignifojn, kiuj substreku lian amaran ironion.

Sume. La Infana liaso estas kuraĝa provo adapti la Esperanto-poezion al lasttempaj tendencoj en la naciaj literaturoj. Inter la ne ĉiam laŭ arta vidpunkto egalvaloraj kantoj kulminas I, V, XXV. Kelkaj duontuŝas la limon de la kompreneblo, de la ĝueblo... aŭ ĝin transiras, eĉ por la „elito” de la poeziamantoj kiun la verko speciale voĉas tusi. En W. Auld ni ĝoje salutas promesplenan poeton, kies kariero espereble brile disvolviĝos. La eldonajo estas bone prizorgita kaj plaĉaspekta : la famo de la „Stafeto” ne plu estas farenda. Sed tre dezirinda, ke la klariga listo estu pli ampleksa. Ne usualoke por solvi enigmojn leganto malfermas poemaron.

Kompletige al tiu recenzo ni aldonas ke la ilustraĵoj estas nun tute aliaj, kaj kompreneblaj. Bedaŭrinde la eldoninto ne aldonis liston de tiuj netroveblaj vortoj. Kontraŭe estas jes la tiel necesaj klarigaj notoj. Mokridinda estas la aserto de la aŭtoro en la enkonduko al tiuj notoj : „Mi mem ne povis kompreni la neceson por tiaj notoj...” (.) sur paĝo 97, 3 alinio. Sur sama p., iam pli sube, li diras ke ĝis nun neniu indikis al li tiujn malklarajn partojn. Ĉu el tiu diro ni devas konkludi ke W. Auld neniam legis tiun-ĉi recenzon ?? Kun tiu recenzo ni ankoraŭ nun povas tute akordiĝi, mi kredas. Ankoraŭ detalo, ne malgrava : en nia tempo, en kiu la libroj iĝis tiel multekostaj, la jena eldono (vere en malpli granda formato, sed havanta pli da paĝoj) estas malpli kosta ol la antaŭ eldono. Rekomendo ne plu necesas.

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

TRANSPRENO	129.005 F
S-ro Cuypers R. (Mechelen)	2.500 F
Koran Dankon !	131.505 F

(Paĝoj akceptataj pere de la p&ck 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

Zora Heide : „Ni, Homoj...” Ses rakontoj. 69 paĝoj. Formato de la libro : 21 x 25. Prezo : 9 Danaj Kronoj. Eldonis la Dansk Esperanto-Forlag kies direktoro estas S-ano L. Friis en Aabyhoj (adreso : Ingmannsvej 9).

Zora Heide estas Jugoslava esperantistino kiu edziniĝis en 1960 al Dana samideano, kaj kiu loĝas nun en Danujo. La ses rakontoj estas senpretendaj. La komenca situacio ĉiufoje estas tia ke ĝi kaptas la atenton ĉar oni atendas iun renversan eventon. Fakte okazas...nenio. Do oni ne trovas dramojn. Tamen la priskriboj estas tiel bonaj ke oni legas kun plezuro. La lingvaĵo estas sufiĉe simpla tiel ke oni povas rekomendi la libron ankaŭ al komencantaj esperantistoj. Restis kelkaj preseraroj.

F. Faulhaber : „Ne tiel, sed tiel-ĉi”. Dua eldono prizorgita de Dansk Esperanto-Forlag en Aabyhoj en Danujo. (direktoro : S-ano L. Friis). 64 paĝoj. Prezo : 7,50 Dan. Kronoj.

Kun ĝojo ni salutas la duan eldonon de tiu konsilaro pri stilo. Kvan-kam la enhavo estas la sama, la artikoloj estas kelkloke reverkitaj.

Oni priatentu - kompreneble ĉion - sed precipe kion la aŭtoro diras pri la neologismoj. Ni deziras saman sukceson kiel al la unua eldono. Grupvidantoj pripensu ankaŭ ke tie ili trovas abundan materialon por okazigi interesajn prilingvaĵajn grupkunvenojn.

A.A. Leenhard : „Somera Simfonio”. Poemaro. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag sub direkto de L. Friis en Aabyhoj, Danujo. Prezo : 9 Dan. Kronoj

Kolekto de dek naturpriskribaj poemoj. Kiel tiaj ili estas belaj. Nur du rimarkoj : 1) Ni ne komprenas sur paĝo 13 „kaj pesas ja hirundoj”. Iam ajn hirundoj pesis..kaj kion ili pesis ?? 2) La fino de la poemo „Somero-Adiaŭo” estas banala, ne poezieca. Ĉiun poemon ilustras bela desegnaĵo. La libro estas presita je nur 500 ekz. kaj havas 27 paĝojn + 5 blankaj paĝoj ! Ĉu por noti rimarkojn ?

Geraldo Mattos : „Arĉoj”. Poemaro. 124 paĝoj. Prezo : 1.50 Us Dol. En la serio de la „Belletraj Kajeroj (malgranda formato) eldonis „Stafeto” en la jaro 1967 (sed presofino nur en dec. de 1968 ?)

Ni pensas ke ne multaj salutos tiun ĉi poemaron kun granda entuziasmo. Estas en ĝi vere belaj poemoj. Sed enestas ankaŭ multaj (tute) ne kompreneblaj versajoj... kiuj, plie, ne sugestas iun ideon aŭ senton. Tial tiuj poemoj ne „parolas” al ni. Tio estas nia tre subjektiva opinio. Legante ilin oni tre ofte bezonas ne nur la Plenan vortaron sed ankaŭ la suplementon al ĝi. Ankoraŭ estas multaj netroveblaj vortoj, pri kiuj ne estas listo. De kelkaj ekzistas la ebleco ke temas pri preseraroj. Sed ankaŭ tian liston oni vane serĉas : Estas kvazaŭ la verko estas eldonita sen konvinko. Tamen, mi ripetas, estas belaj poemoj ; ili troviĝas ĉefe en la parto „Largo”, kie la aŭtoro priskribas divocajn homtipojn.

Ramona van Dalsem : „Simplaj Floroj”. Tekstoj kaj melodioj sur muziknotoj. 26 paĝoj. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag sub direkto de L. Friis en Aabyhoj en Danujo. Prezo : 9 Dan. Kronoj.

Muziko estas eble la plej subjektiva inter la artoj por esti juĝata. Tamen ni kredas ke tiuj melodioj de la jam famkonata Ramona van Dalsem trovas ĝeneralan ŝaton. Tial ni laŭdas la fervoran eldonanton L. Friis kiu en la lastaj monatoj distingiĝis pro multaj valoraj eldonoj.

„SENNACIECA REVUO” 19a kajero. Eldonis S.A.T. 67 Avenue Gambetta, Paris 20.56 paĝoj. Prezo : 1 Us. Dol. - 5,50 Fr.Fr. 2

Tiu revuo estas denove tre interesa. Enhavo estas plej varia. Feliĉe, kaj kompreneble, ne mankas la.. ridpunkto de R. Schwartz. El la enhavo ni citas i.a. artikolon pri urbo Augsburg ; pri filizofo Spinoza (ankoraŭ signifoplena por nia moderna tempo !) ; pri Marks kaj la nuna socio ; pri la UNO ktp. La libro estas bone ilustrita ; kaj la ilustraĵo sur la titolpaĝo estas sugesta. Jam pro multjara sperto ni scias ke tiuj aĉetas kaj legas ĝin ricevas valoran spiritan nutraĵon. Rekomendo ne plu estas bezonata. Unu konsilo : rapide aĉetu antaŭ ol ĝi estas elĉerpita.

Internacia feriosemajno en la Nigra Arbaro (Germanio)

En la bela Nigra Arbaro okazos de l. ĝis 7 agosto 1970 (post la SAT-kongreso) internacia feriosemajno, organizata de la Turista Asocio la Naturamikoj, Esperanto-Fako. Vi loĝos meze en tiu bela pejzaĝo, en la TAN-domo Kniebis, proksime de la urbo Freudstadt. La kostoj estas tre favoraj ! Pluajn detalojn, precipe pri prezoj, ekskursoj, ktp., vi ekscios de S-ro Gerhard Kunze, Halden 333, D-7291 Wittlensweiler, Germanio, kiu ankaŭ akceptos vian aliĝon. Ni rekomendas la alian aliĝon, ĉar la nombro de partoprenantoj estas limigita.

M. Führer

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvb.

ANTWERPEN, 8, Vleminckveld

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

de la 19a ĝis la 26a de septembro

ITALA KONGRESO SURMARE

Temas pri krosad-kongreso sur granda ŝipo „CARIBIA” (24 500 tunoj), al kiu estas aparte invitataj la eksterlandaj geesperantistoj. Ili rajtos enŝipiĝi ne nur en Genova (de kie la ŝipo forveturos **la 19an de septembro**), sed ankaŭ en Cannes, Barcelona kaj Palma de Majorca, kie okazos la unuaj tri haltoj. Poste, la „kongres-urbo”, atingos Bizerte (Tunis), Palermo kaj Capri (Napoli).

La reveno al Genova okazos **la 26-an de septembro**,

La ŝipo estas komforte ekipita (3 restoracioj, 3 orkestroj, 4 naĝejoj, ĉiuj kajutoj estas klimatizitaj).

Ĉu por tiu eksterordinara kongreso ankaŭ la kosto estos tia ?

Tute ne : favora rabato ebligos partopreni la krosadon elspezante eĉ nur 69 000 it. lirojn, ĉio inkluzive, kun aranĝo en 4-lita kajuto turist-klasa. Gejunuloj ĝis 25-jaraj ĝuos kroman rabaton kaj pagos entute 54 000 it. lirojn. La kongres-aliĝo estas senpaga por eksterlandoj.

Petu detalajn informojn ĉe : **Torina Esperanto-Grupo / 41-a Itala Kongreso de Esperanto — Poŝtkesto 198 — TORINO 10121 — Italujo**”.

LA ESPERANTO-JUNULARO : RACIAJ INTERNALISTOJ

“Reciprokaj kompreno kaj respekto nepras por kreado de paca mondo.” Per tiaj grandesprimaj vortoj, Konferenco de Unesko pri la Junularo antaŭ kelkaj jaroj pritraktis la internacian komprenon. “Hodiaŭ,” deklaris ĝia raporto, “la internacia vivo okupas ĉiam pligrandiĝantan lokon en la atento de la tuta junularo.” Tiajn kontaktojn inter gejunuloj “malhelpas lingvaj diferencoj.”

Tiuj, kiuj multe vojaĝis en aliaj landoj, aŭ multe kontaktis kun alilandanoj, scias, ke la vortoj de la Unesko-konferenco estas konsternaj. Vole-nevole, la nacioj estas hodiaŭ puŝataj al ĉiam kreskanta interkontaktado. Precipe la junularo tion spertas. La specialistoj atentigas nin, ke la batalo kontraŭ malriĉo, analfabetismo kaj malsano estas internacia batalo, en kiu nepras la harmonia kunlaboro de la nacioj.

Sed plej baza ilo de kunlaboro - la lingvo - mankas. Ni estas firme limigitaj al la propraj lingvogrupoj, mutaj antaŭ alilingvanoj. La gejunuloj en la Uneskokonferenco (kaj iliaj reprezentatoj) rekonis la sensencan perdon de energio pro lingvaj diferencoj, sed ne povis trovi bonan solvon. Ili rekomendis lingvolernadon, terminarojn, tradukadon - iom primitivaj kaj multekostaj rimedoj.

Sed unu grupo de gejunuloj solvis la problemon laŭ maniero racia kaj inteligenta. Tiu grupo estas la Esperanto-parolanta junularo.

En 1964, ikam okazis tiu konferenco en Grenoble, malmultaj gejunuloj en internaciaj medioj sciis pri la ekzisto de la internacia lingvo Esperanto. La esperantistoj ne estis invitataj partopreni la konferencon, kaj Esperanto ne levigis en la diskutoj. Hodiaŭ, tamen, tiu situacio ŝanĝiĝis. Verŝajne la plimulto de junaj funkciuloj en internaciaj organizoj, eĉ se ili ne intime konas Esperanton, scias pri kio temas. Kaj ili ofte estas tre favoraj al la ideo de internacia lingvo kiel solvo de la monda lingvo-problemo. Parolantoj en internaciaj junularaj konferencoj ofte mencias la lingvon ; aludoj al ĝi aperas en la junulara gazeto.

Al kiu atribui tiun rimarkindan ŝanĝon ? Precipe al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. TEJO estas la ĉefa internacia organizo por junaj parolantoj de Esperanto, kun 23 landaj sekcioj kaj cirkaŭ 10.000 membroj. En la lastaj jaroj ĝi kreskis ĝis tiu staturon, post jaroj kiel malgranda klubeca organizo. La kresko ĉefe rezultis el saĝa gvidado kaj efika kanalo de la junularaj idealoj. Tio respeguliĝas ekzemple en la eldonaĵoj de TEJO. Ĝi aperigas novajbultenojn en tri lingvoj (angla, franca, Esperanto). Ili estas distribuataj ankaŭ al junaj funkciuloj en internaciaj organizoj. Ĝi ankaŭ eldonas lukse ilustritan revuon, “Kontakto.” Ĉar TEJO-anoj ne estas sektecaj lingvoamantoj, sed energiaj mondĉivitanoj, ili dediĉas sian revuon ĝuste al mondaj problemoj - tiuj pri kiuj avertas nin la jam menciitaj specialistoj. TEJO-anoj dialogas pri tiuj problemoj trans la landlimoj.

Rilatoj kun aliaj junularaj organizoj estas nur unu faceto de la agado de TEJO. Por ĝin subteni, aliĝu al TEJO kiel Patrona Membro, aŭ, se vi estas malpli ol 26-jara, kiel individua membro. Skribu por informoj al : TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

H. T.

(69/1)

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda stelo"
Kunsidoj : Ĉiumerkrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15
2000 Antwerpen, je la 20,15a horo.
Poŝtĉekonto : 726.54 (Deurne)

La 7an de januaro 1970 S-ro I. Durwael - helpe de lumbildoj kaj diapozitivaj - prizorgis tre interesan "Reirigado al la jaro 1969".

La 14an okazis la Jarkunsido sub prezidanteco de S-ro M. Jaumotte, Honora Prezidanto, ĉar S-ro J. Verstraeten, prezidanto, estis malsana. La sekretario, S-ro P. Peeraerts, kaj la kasisto, S-ro R. Balleux, prezentis siajn jarraportojn kiujn oni aprobis. La gejubileantoj estis festataj kaj honorigataj per medaloj. Ricevis la ORAN MEDALON (pro 50 jara membreco) : S-inoj L. Faes kaj Marg. Jaumotte ; - la bronzan medalon + 2 arĝentajn steletojn (20 jara membreco) : F-inoj L. De Winter, H. Heyens kaj G. Leibovitche ; S-inoj N. Balleux, L. Bernaerts, G. Debacker, A. Govaerts, S-roj R. Balleux, A. Debacker, F. Schellekens, E. Seghers, A. Vercruyssen, A. Verhoeven kaj J. Verstraeten ; la bronzan medalon + 1 arĝentan steleton (15 jara membreco) : F-inoj A. Enzlin, C. Schellekens, L. Verdyck, S-inoj J. Peeters, P. Tytgat, S-roj E. Paesmans, C. Tytgat ; bronzan medalon (10 jara membreco) : F-ino A. De Roover, S-inoj Fr. De Roover, E. Riadis, S-roj W. Tytgat, K. De Roover, F. De Roover kaj M. De Roover. La vicprezidanto, S-ro Jo Haazen, speciale alparolis kaj honorigis S-ron M. Jaumotte per la transdono de medalo kun oraj palmoj. Dimanĉon, la 18an en restoracio "La Coupe Glacée" bankedo kunigis ± 30 gefestenantoj. 4 Bruselaj gesamideanoj ĉeestis inter kiuj Ges-roj R. Jacobs kaj S-ro G.C. Fighiera. La sfero festa kaj tombolo kontentigis ĉiun.

La 21an F-ino A. Enzlin, kiu vizitis Brazilon dum pli ol unu monato, faris rimarkindan paroladon pri "Brazilio", la ĉefurbo de la lando, kun lumbildoj kaj diapozitivaj.

Vendredon, la 30an, pli ol 25 verdstelanoj vizitis la "Poppenschouwburg

GRUPA VIVADO

Van Campen" kaj ĝuis prezentadon de la teatraĵo "De Zwarte Ridder".

La 4an de februaro S-ro R. Jacobs, Prezidanto de brusela grupo, paroladis pri "La Lago de Iseo" kaj montris rimarkindajn diapozitivajn.

La 11an S-ro R. Van Eynde prezentis siajn jam tradiciajn dokumentajn filmojn inter kiuj unu parolata en Esperanto fare de S-ro P. Peeraerts.

agrablan diversecon en la programo La 18an S-ro E. Paesmans alportis per sia parolado pri "Poŝtmarkoj rakontas". La publiko ĝuis la valorplajn lumbildojn.

La 25an sub gvidado de S-ro Jo Haazen vespero estis organizata en la kadro de "Semajno de la amikeco". Ĝi okazis en la festsalono de la malnova muzikkonservatorio kun programo tiel varia kiel ampleksa. Same kiel en kongreso estis multaj eksterlandanoj kiuj salutis la ĉeestantaron en sia nacia lingvo. Muziko kaj folkloraj dancoj plenigis grandparte la programon. La salono estis plenplena kaj la sukceso pli ol atendita !

La 4an de marto S-ro G.C. Fighiera, paroladis pri sia vojaĝo al "Hong Kong". Li prezentis diapozitivajn kaj komentis ilin pri la moroj kaj kutimoj kaj partoj el la historio de tiu internacia regiono.

La 11an S-ro F. Schellekens gvidis la ĉeestantaron per "La Kamero tra Norda Italujo" montrante memfaritajn belkolorajn diapozitivajn.

La 18an S-ino R. Lecat faris paroladon pri "Bahaismo". Ĉar ĉeestis pluraj adeptoj de tiu religio ekestis ege interesa debato.

La 25an S-ro Jo Haazen parolis pri "La Vivo kaj Verkoj de Arturo Toscanini" kaj donis multajn detalojn el la kariero de tiu mondfama orkestrogvidanto. Je tiu okazo S-ro R. Van Eynde montris filmon en kiu oni povis admiri Toscanini(n) en plena aktiveco. Belega vesperon !

La 1an de aprilo S-ro I. Durwael plensukcese gvidis "Kulturan distran Vesperon".

La 8an, japanino, F-ino Kimie Ozawa, vizitis la grupon kaj paroladis pri sia mondfama lando Japanujo. Ŝi montris belajn kolordiapozitivajn pri la tipe japana vivo. Ŝi prezentis ankaŭ la japanan kalkulsistemon "Soroban". Por tiu lasta eĉ la belga televido montris intereson ĉar ŝi sendis la grupon de "Echo" por kapti plurajn bildojn kiuj estis elsenditaj dum la sekvanta sabato. Estis eksterordinare multaj ĉeestantoj, regis entuziasma atmosfero.

La 22an S-ro H. De Roover paroladis pri "Gauguin", la franca artpendisto.

La 29an Ges-roj Imelda kaj Jo Haazen flegis programon kiun ili nomis "Gajaj kaj malgajaj momentoj en la Vivo de antverpena Familio". Temis ilia propra vivo el kiu rakondis kaj prezentis lumbildojn kaj filmfragmentojn jen pitoreskajn, jen humorplenajn.

La 6an de majo F-ino A. Enzlin daŭrigis sian paroladon pri Brazilo kaj montris pliajn diapozitivajn.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92

Entrepreno de
KONSTRŬAJJOJ

La 13an okazis kunsido kies temo "Aktualaj" invitis la ĉeestantojn al kunlaboro. Kontribuis : F-ino M. Hofkens (kun spritaĵoj), S-ro J. Verstraete

ten (prelego el libro) kaj S-ro Jo Haazen (gramatikaj kaj lingvaj problemoj)

La 20an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn La Esperanta filmo estis parolata de Ges-roj Lutgarde kaj Koen Donckers.

La 27an S-ro R. Van Eynde faris paroladon pri "La tempo kiam mi soldatiĝis". La sprita maniero, la humorplenaj aventuroj kaj la fotografaj kune zorgis ke laŭtaj ridoj plurfoje aŭdiĝis de el la publiko.

BRUGGE : "Paco kaj Justeco" kaj la junulara grupo.

Ekster la ordinaraĵoj, ni citu la viziton de F-ino Kimi Ozawa kiu paroladis pri sia lando, montris bildojn kaj, precipe, prezentis la simplan kalkulaparaton per kiu oni povas fari ĉiaspecajn, ankaŭ plej komplikajn kalkulojn. La Bruĝa gazetaro interesiĝis kaj publikigis artikolon kun foto. Rilate al la laboro, estas ĉefe la stato sur terenoj de propagando, de literaturo, de organizado ktp kiu okupas nin. Ekzemple, ni legis en grupkunveno la gravan artikolon pri lingvaj malfacilaĵoj, kiu aperis en la monata organo de la Eŭropaj Komunumoj. Ni ensendis nian vidpunkton, kiu estis ankaŭ publikigita. (numeroj de feb. kaj de aprilo '70 de "Europese Gemeenschap" ; adreso : Al. Gogelweg 22, Den Haag).

La junulara grupo estas eksterordinare agema. Krom la regulaj kunvenoj en kiuj oni studas la lingvon aŭ la problemojn de la esp.-movado, ĝi partoprenas diversajn manifestaciojn (kongreso de Aachen) kaj kune iras kun la Jeugdraad de St-Kruis al aliaj manifestacioj kiel la Flandra Nacia Kantefesto en Antverpeno, kaj la Izerpilgrimado en Diksmuide. Tiel ĝi konatigas esperanton kaj la grupon al la ekstera publiko.

**ATENTU : tiu-ĉi numero de Sonorilo estas la lasta por tiuj
kiuj ne repagis sian membro-kotizon aŭ abonon.**

manufakturaĵo ŝirmo DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen : Aalmoezenierstr. 2
Anselmostr. 17
Nationalestr. 87
Leysstraat 10

Arlon : 12 Marché-aux-Légumes

Brugge : Breidelstr. 8

Brussel : Anspachlaan 194
Oude Kleerkoperstr. 31

Gent : Brabantdam 21

Herstal : 4 Rue Large Voie

Leuven : Bondgenotenlaan 13

La Louvière : 16 rue Albert 1er

Luxembourg : 67 Place de la Gare

Mechelen : IJzeren Leen 32

Oostende : Kapelstraat 23

Roeselare : Ooststr. 124

Tournai : 75 Rue Royale

Turnhout : Herentalsstr. 6

Verviers : 2 Pont St. Laurent

Wetteren : Jos Buyssestr. 39-a